# Kongreso de la Popoloj
# Reglamento
# Tabelo de la proponitaj ŝanĝoj

NB La modifoj estas ĉefe la rezulto de la transformado de la balotelekta regularo.
La « aldonoj » estas relativaj al decidoj faritaj aŭ al kreaĵoj faritaj dum la antaŭaj jaroj.
La « proponoj » estas plibonigoj faritaj de la verkinto de la rearanĝo de la Reglamento
La proponoj kaj la komentarioj aperas laŭ oblikvaj literoj.

| **Antaŭaj tekstoj (statuto kaj Reglamento)** | **Nova teksto (Reglamento)** |
|---|---|
| Ŝanĝo laŭ la formo<br>Statuto kaj Interna Reglamento estis prezentitaj en du apartaj tekstoj kun similaj artikoloj. | La Reglamento estas unika teksto enkondukata per la celoj de Kongreso de la Popoloj. La rediroj estas forigitaj. |
| La arkitekturo de la teksto, ekde la artikolo 1 ĝis la artikolo 8 estas gardita. | |
| Modifoj de la tekstoj<br>Estas forigitaj :<br>Artikolo 9 : la agadrimedoj (ne elvolviĝinta artikolo)<br>Artikolo 10 : la celoj (vd la novan enkondukon) | Estas aldonitaj la lastaj kreaĵoj :<br>Art. 9 : Saĝula Konsilio (kunsido de 2003)<br>Art. 10 : ASKOP (kunsido de 2003)<br>Art. 11 : Jura Registroservo (kunsido de 2006) |
| Art. 1 : Elektitaj kaj anstataŭaj Delegitoj | La anstataŭaj Delegitoj kunfandiĝis kun la elektitaj Delegitoj (decido de 2003) |
| 1.7. la fakuloj | 1.6. La fakuloj estas elektitaj unu inter la membroj de ASKOP. |
| 3.1. ĉiu estas vokita ununuran fojon por voĉdoni. | 3.6. ĉiu estas vokita por voĉdoni ĉiun naŭan jaron (decido de 2003) La voĉdonantaro estas vokita trione ĉiun trian jaron.. |
| 3.2. planedaj distriktoj | Forlasita projekto, ĉar nerealigebla en la nuna periodo. |
| Art 4. kriterioj de elektebleco | kvar kriterioj anstataŭ du (decido de 2006) |
| 4.1. « viro aŭ ino»<br>11.3. « ... laŭ la nombro da delegitoj aŭ da kandidatoj de difnita ŝtataneco aŭ membroj de difinita organizaĵo aŭ komunumo. » | 4.6. «ekvilibro de la kandidatiĝoj *laŭ kriteroj konformaj al la spirito de la 2a artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* ». |
| 4.5. Financa kontribuo | Forigita tekstero. *En la faktoj neniu financa kontribuo estis iam postulita de la kandidatoj.* |
| Art. 5 : a) Plenumkomitato : 4 membroj aŭ oblo de 4 elektitoj por 4 jaroj | *9 membroj elektitaj trione por trijara mandato.* |
| b) Ĝenerala sekretario : « nek delegito, nek anstataŭa delegito » *Komentario tiu koncepto de apartigo de la posteno de Ĝenerala Sekretario estis imagita de kaj por Guy Marchand.* | *Vidu la artikolon 8. La Ĝenerala sekretario estas membro de la Estraro, same kiel en ĉiuj organizaĵoj.* |
| c) financado | b) *La lica deveno de la monrimedoj estas eksplicita male de monrimedoj, kiuj povus deveni de nelicaj komercoj (drogoj) aŭ nemoralaj (armiloj).* |
| | aldono : c) laborlingvoj. *Esperanto estas proponata tamen ne oficialigante ĝin..* |
| 6. Kunsidoj de la Kongreso de la Popoloj | *La esprimo Plena Kunsido estas anstataŭita de « Plena Asembleo »* |
| 6.1. Ofteco kaj ejoj de kunsidoj | *Forlasita artikolo ĉar la Delegitoj estas taskitaj plej bone agadi laŭ la momentaj cirkonstancoj.* |
| 6.4. Kvorumo de 4/10. | 6.3. (aldono) *enkonduko de la perkoresponda voĉdono (eksperimento farita en 2003. La « telematika vojo » povas esti la retpoŝto, la retkonversacio, la utiligo de aparta ttt-ejo aŭ io alia.* |
| | 6.4. (aldono) produkto de protokolo plej malfrue tri monatojn post la plena Asembleo. |
| 8.3. Unujara mandato por la Prezidanto kaj la vic-prezidanto. | 8.2. *La tuta Estraro estas elektita por trijara mandato.* |
| | 8.9. (aldono) *la Estraro rajtas aldoni al si la helpon de* |

| | |
|---|---|
| | *ne-elektitaj volontuloj. Tiu dispozicio estas proponita kiel pliampleksigo de la decido farita en 2003 koncerne la kreadon de posteno de adjunkta Sekretario (tiam : Bernard Henry) kaj povus utili ne nur al la sekretariato, sed ankaŭ al la financaj aferoj kaj al la komunikado.* |
| Art. Agadrimedoj : (forigita) | Art.9 (aldono) : kreado, konsisto kaj rolo de la Saĝula Konsilio (kreado decidita en 2003, sed sen enhavo). *La ĉi-tiea enhavo estas propono.* |
| Article 10 : Celoj de la Kongreso de la Popoloj (metita kiel enkonduko) | Art.10 (aldono) : Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj (2003) Teksto aprobita dum antaŭaj kunvenoj. |
| | Art. 10.1 (propono) *: prezidanteco de ASKOP far la Prezidanto de Kongreso de la Popoloj aŭ de speciale komisiita Delegito : tio por eviti tian devojiĝon konstatitan dum la ĉeesto de Josep Ortega..* |
| | Art. 11 (aldono) : Jura Registroservo (kreado 2006) Teksto aprobita en Aprilo 2007. |
| Art. 11 : Provizoraj aranĝoj : Vd. la artikolon 4. | Art. 12 : (propono) Provizoraj dispozicioj : *maniero por aprobi la modifojn de la Reglamento de Kongreso de la Popoloj. Referenco al la naciaj kaj internacia juroj por la ne-antaŭviditaj aferoj.* |